Sinjoro Dio,

Viajn servantinojn Jula, Berchmana, Krizina, Antonia kaj Bernardeta Vi pridonacis per la graco de la monaĥina servo kaj per la forto ke ili konfirmu sian fidon kaj amon al Vi per sangverŝado.

Donu ankaŭ al ni persiston en la fido por ke eĉ pro sufero ni ne disiĝu de Vi.
Faru al ni, ke ilia ekzemplo kaj ilia propeto nin helpu en la vivobataloj kaj ĉe la akiro de la eterna savo.

Per Kristo nia Sinjoro. Amen.

# LA KRUCVOJO
# DE LA DRINAJ MARTIRINOJ

# LITANIOJ
# DE LA DRINAJ MARTIRINOJ

La tekstoj prenitaj el la libro  “Sve za Boga”

Esperantigis: Marija Belošević

Lektoris: Lucija Borčić

Enpaĝigo kaj grafika aranĝo: Marija Belošević

Eldono preparita okaze de la beatigo de la Drinaj martirinoj.

Eldonis:
Kroata esperantista Unuiĝo kaj IKUE sekcio en Kroatio

Kontakto:
Sveti Duh 130, Zagreb
marija@hes-keu.hr

Zagreb, septembro 2011

ENHAVO

LA KRUCVOJO DE LA DRINAJ MARTIRINOJ 3

LITANIOJ DE LA DRINAJ MARTIRINOJ 19



# LA KRUCVOJO DE LA DRINAJ MARTIRINOJ

***Enkonduko***

Ni sekvas Vin, Sinjoro, dum Via krucvojo kun la tiomaj kiuj la krucon libervole akceptis kaj vin postsekvis. Inter ili estas la Drinaj martirinoj. Ili estas atestantinoj ke indas vin kredi kaj en viajn manojn doni sian vivon. Ili estas niaj gvidantinoj tra la sovaĝejo de niaj vivoj. Sian fidon ili demonstris ne nur vorte, sed ankaŭ sekvante vin ĝis la martira morto.

Dum ĉi tiu krucvojo ni sekvas iliajn lastajn tagojn preĝante al vi, ke pere de ilia porpeto vi helpu nin porti la krucojn de nia vivo.

*Staris la Patrin' dolora*
*ĉe la kruco larmoplora,*
*dume pendis ŝia Fil'.*

***Unua Stacio: Jesuo estas kondamnata al morto***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Per konstanta pafado kaj tintado de armiloj oni ĝenis la fratulinojn en ilia modesta monaĥejo en Pale nomita „gastejo de mizeruloj“. Ili invadis en la monaĥejon. La mizeruloj ne plu povas esti en sia „hotelo“. La lunĉon kiu estis tie ĉiutage kuirita por ili, la mizeruloj ne plu manĝos. La komencitaj laboroj restos nefinitaj, ĉar en la domo ne plu estos fratulinoj. Iuj aliaj homoj, nekonataj, nun paŝas en ĝi. Ili kaŝseĉas en ĉiu angulo kaj ili prenas ĉio kio plaĉas al ili. Hodiaŭ la fratulinoj komencas sian krucvojon de Pale tra Romanio ĝis Goraĵde.

Sinjoro, Vin oni ligis, kaj al ili oni ordonis forlasi sian hejmon. Ni preĝas, donu al ni la forton akcepti la nejustan kondamnon, akcepti ilin per la interna libereco de la animo. Nin portu ankaŭ la forta kredo ke vi ĉiam estas kun ni.

*La animon ŝian ĝeman*
*ĉagrenitan, malĝojplenan*
*trapenetris glav-pikil’.*



Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo,
Kompatu nin, Sinjoro!

Preĝu por ni, la beataj Drinaj martirinoj!
Por ke ni fariĝu indaj je la promesoj de Kristo!

***Ni preĝu:***

***Dio, per nevidebla potenco Vi flamigas la korojn de viaj favoratoj! Laŭ la porparolo de la fratulinoj Jula, Berchmana, Krizina, Antonia kaj Bernadeta konservu en ni la flamon de la fido donita al ni per la bapto ke ni alportu fruktojn indajn por la vivo eterna. Laŭ Kristo, nia Disinjoro. Amen*.

Per viaj votoj, helpu nin!
Per viaj fidoj al la Fianĉo,
Per via preteco servi la Sinjoron,
Per viaj preĝoj kaj pieco,
Per viaj oferoj kaj rezigno,
Per viaj fido, espero kaj amo,
Per viaj vokacio kaj reago,
Per via amo al proksimuloj,
Per viaj lastaj paŝoj dum ekzilo,
Per via lasta vekkrio: „Jesuo, savu nin!“,
Per viaj martiraj mortoj,
Per viaj meritoj de kompleta sinofero,
Per via pardonpeto al la malamikoj,

Porparolantinoj niaj, kun vi ni pledas: Jesuo, savu nin!
Kiam malbono nin ekregas,
Kiam ni dubas,
Kiam ni endanĝeras,
Kiam ni malĝojas kaj tristas,
Kiam angoro kaj amksio nin premas,
Kiam ni estas forlasitaj,
Kiam ni nenion havas,
Kiam ni malsanas,
Kiam peko nin premas,
Kiam ni inklinas al malbono,
Kiam ni estas kalumniataj,
Kiam ni perdas paciencon kaj amon,

Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo,
Indulgu nin, Sinjoro!
Ŝafido de Dio, kiu forigas la pekojn de l' mondo,
Ellaŭdu nin, Sinjoro!



***Dua Stacio: Jesuo transprenas Sian krucon***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Aŭdinte ke soldatoj eniras la domon, la fratulinoj ektimis. Kvankam al neniu ili agis malĝuste, ili sentis ke tiuj visitantoj estas ne estas prudentaj kunparolantoj. Estas bone atendi plej malbonon, esti unuigita kun la Sinjoro. Ili venis en la ĉambron kie kiel gasto loĝis iu pastro. Ili falis sur la genuojn, petante pekliberigon. Ne konfuzita, la pastro koncedis. Nun estu, kio estos. Tiu kiu akceptas la krucon tion faras sciante ke tiu kruco povus esti mortigita por li. Estas konsole iri renkonten al neantaŭvideblo tolerema al ĉiuj.

Vi, Sinjoro, preĝante en la Ĝardeno de Getsemano, akceptis ĉion kio estis. Donu okazonte al ni la saĝecon akceptadi la malfacilajn situaciojn, kaj la saĝecon vivi en paco kun Vi, kun si kaj la proksimuloj.

*Kiel trista, afliktita*
*estis la Virin' benita,*
*la Patrin' de l' Solnaskit'.*

***Tria Stacio: Jesuo falas la unuan fojon sub la krucon***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Elpelitaj de sia monaĥejo, la fratulinoj klopodas kolekti la pensojn kaj kompreni kio okazas al ili. Eble okazis ia miskompreno? Ĉu ili provu pruvi al la soldatoj kiuj kaj kio ili estas? Aŭ la soldatoj mem, laŭ ilia trankvila kaj digna konduto konkludos ke ili estas virinoj, monaĥinoj kiuj al neniu faris ion ajn malbonan.

Kiam ni mem troviĝas en la situacio ke ni ne scias kiel reagi aŭ kiel rilati al malbono kiu ĉirkaŭis nin, kiam ni komencas mediti pri tio ke ni eble devus reagu sammaniere, Vi, Sinjoro donu al ni paciencon, mensoklaron kaj forton de la koro por prefere akcepti la propran nepovon ol sekvi la malbonon.

*Ŝi funebris kaj trepidis,*
*dum la gloran Filon vidis*
*punsuferi sen hezit'.*



## LITANIOJ DE LA DRINAJ MARTIRINOJ

Sinjoro, kompatu nin!
Kristo, kompatu nin!
Sinjoro, kompatu nin!
Kristo, aŭdu nin!
Kristo, ellaŭdu nin!

Patro ĉiela, Dio, kompatu nin!
Filo, Redemptoro de la mondo, Dio, kompatu nin!
Sankta Spirito, Dio, kompatu nin!
Sankta Triunuo, unu Dio, kompatu nin!

Fratulino Jula, preĝu por ni!
Fratulino Berchmana,
Fratulino Krizina,
Fratulino Antonija,
Fratulino Bernadeta,

Drinaj martirinoj, preĝu por ni!
Virgulinoj votitaj,
Virgulinoj puraj,
Virgulinoj malriĉaj,
Virgulinoj obeemaj,
Virgulinoj maldormaj,
Virgulinoj saĝaj,
Virgulinoj imitindaj,
Virgulinoj kuraĝaj,
Virgulinoj martirinoj,

***Ferma preĝo***

La helpokrion „Jesuo, savu nin!“ per kiu la Drinaj martirinoj iris al la morto, aŭdis tiu al kiu ĝi estis direktita. Jesuo, Vi savis, Viajn fidelajn servantinojn. Sian krucvojon ili finis en Via Regno, ne sub la fenestro de kazerno. Dankon kaj gloron, al Vi kiu la malfortan savas de la forta, la turton de la akcipitro. Vi ŝirmas tiujn kiuj Vin amas kaj Vi gardas ilin dum la fatala tago.

Dankon al Vi pro la grandega savo per kiu vi senĉese pridonacas nin. Dankon pro la frukto de via kruco. Amen.

Laŭdata estu Jesuo Kristo, nia krucumita Savanto
kaj lia Patrino Maria, trista sub la kruco.

*Min pensigu Kristo-morton,*
*helpu sekvi sufer-sorton,*
*kulti vundojn de l' Sinjor'.*

*Min irontan de ĉi tie,*
*Di', per la Patrin' premie*
*al venkopalmo gvidu for.*

*Post la korpa mort-destino*
*donu, Kristo, al l' animo*
*lumon de l' paradiz-glor'.*



***Kvara Stacio: Jesuo renkontas Sian patrinon***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Dum oni forkondukas ilin, la fratulinoj retorigardas al la hejmo. En la pensoj ili apartigas tiun lastan momenton kiam ili estis devigataj forlasi la domon. Nun ili devus esti en la kapeleto okaze de la komuna preĝo. Ili devus diri al Vi dankon por la pasita tago, por la laboro kiun ili finfaris, pro la homoj renkontitaj, pro la donacoj de Vi ricevitaj. Sed la trankvilo de la kontstanta ĉiutaga okazado estis interrompita per perforta invado en ilian vivspacon kaj vivtempon, en iliajn vivojn.

La vivsituacioj, Sinjoro, nin ofte kondukas al tio, ke ofte ni ne kapablas nek eblas plenumi ĉion deziratan kaj necesan. Gardu en ni la pacon kaj racion ke ni ne cedu al tento de impulsiĝemo, senpripensaj decidoj kaj serĉado de rapidaj solvoj. Helpu nin, por ke nian tempon ni sciu tiel dividi ke ĝi sufiĉu por preĝo kaj laboro, por ripozo kaj kunestado.

*Kiu de la plor' sin gardus,*
*Krist-Patrinon se rigardus,*
*senmezure en turment'?*

***Kvina Stacio: Simono el Kirenohelpas al Jesuo porti la krucon***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Ege timigitaj kaj frostitaj, la fratulinoj paŝas la vojon pri kiu ili ne scias kien ĝi kondukas, nek kien ĝi iras. Dumvoje ili renkontas scivolajn rigadojn. Iuj rigardas ilin per la miro, iuj kompatas ilin, sed iuj per kontento malestimas. La pli multo de la lokaj homoj scias kiuj ili estas kaj de kie ili venas. Tamen, neniu kuraĝis publike interveni por ilia liberigo, nek ion ajn diri favore al ili.

Ankaŭ ni, Sinjoro, estas ofte katenitaj de multaj timoj. Kvankam ni sentas maljustecon, ni ne havas forton ĝin laŭte nomi kaj batali por tiu justeco. Ni prefere retiriĝas kaj silentas, ŝajnigante ke tio ne koncernas nin.
Al ni mankas la forto de Simono el Kireno. Devigita de maljustuloj, li elpaŝis al la Justo. Plifortigu nin, Sinjoro, kiam ni frontas proprajn timojn.

*Kiel eblus trist-abstino*
*dum observ' de Krist-Patrino*
*kun la Fil' en dolorsent'?*



***Dekkvara Stacio: La korpo de Jesuo estas entombigata***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La fratulinoj, samkiel multaj viktimoj de malamo kaj de perforto, restas sen vera tombo, transdonitaj al la akvoabundo de Drina. Ĝi donis al ili novan nomon: ekde nun ili estas la Drinaj martirinoj. Kaj ili igis Drinan esti la ripozejo, de tiuj kiuj per suferoj, sed beataj, endormiĝis ĉe la Sinjoro. Arbaro iĝis kaŝita tombo de la plej maljuna fratulino kiu estis disigita de la aliaj.

Sinjoro, igu ke ni ofte memoru pri nia forpasemo kaj pri ĉio kion per morto ni perdas kaj portlasas post ni. Sed ankaŭ ke ni memoru ĉion kion per morto ni ricevas kaj trovas. Ni neniam restas sen io ajn, eĉ kiam ni havas nenion plu, eĉ ne la tombon. Neniam ni restas la propra vivo kaj sen ni mem. Helpu nin, ke nia vivo neniam restu sen Vi. Nek nun, nek eterne. Vi estu nia Savanto kaj Savanto de ĉiu homo.

*Virgulino plej glor-bena,*
*por mi ne maldolĉ-miena,*
*min kunprenu en la plor'.*

***Dektria Stacio: La korpo de Jesuo estas forprenata de la kruco***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La mortaj korpoj restas kuŝi sub la fenestro de la kazerno. Oni forpuŝos ilin al la bordo de la rivero Drina. Forpuŝitaj de la homoj kaj lasitaj ĉe la rando de la vivo, ili kuŝas sur la sino de la tero, kaj tiam estas transdonitaj al la akvo. La kompato devis esti ne esprimebla, nenia kondolenco kaj nenia omaĝo. Ĉar tio estus silenta kondamno de la krimo.

Sinjoro, ĉiujn kiuj mortis sen homa kompato, ĉiujn perforte kaj senkaŭze murditajn metu en la sinon de Via Patrino kaj ilin transdonu por eterne en la brakojn de Via kaj nia Patro. Vi estu konsolo por la malĝojigitaj kiuj serĉas siajn malaperintojn kaj perditojn. Redonu la vivon al la vivoj de tiuj kiuj ne scias pri la tomboj de siaj amataj.

*Ĉe la kruco kun vi stari,*
*kune plendi kaj amari*
*mi deziras en lament'*



***Sesa Stacio: Veronika donas viŝtukon al Jesuo***

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Ili kondukis la fratulinojn en iu domon. Sur la vilaĝoj de la gastigantoj videblas kompato al la neinvititaj gastinoj. Certe, la fratulinoj eksentis faciliĝon. La gastiganto defendas ilin, kaj petas ke ili lasu ilin, ĉar ili al neniu faris ion malbonan. Tie dum mallonga tempo ili lasas ilin, minacante al la gastiganto ke li respondecos se ili forkuru. Kaj ili eĉ ne pensas pri forkuro. Ili deziras iom varmiĝi kaj ripozi, kaj iom sekigi la piedvestojn. Ĉion ĉi ebligis al ili tiu familio.

Ekzistas bonaj agoj kiuj ne povas ŝanĝi ies destinon, sed ili povas atesti pri homeco kaj miserikordo. La tukon donita de Veronika. La ŝirmo donita al la fratulinoj en tiu modesta familio. Igu, Sinjoro, ke ĉiu bonfaro portu frukton al tiu kiu ĝin faras kaj ankaŭ al tiu al kiu ĝi estas farata. La miserikordan amon sentu ankaŭ tiuj kiuj ne havas kompaton por la aliaj.

*Pro pekar' de l' genio sia*
*ŝi Jezuon agonia*
*vidis kun la skurĝ-vundiĝ'.*

## *Sepa Stacio: Jesuo la duan fojon falas sub la krucon*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La vojo daŭre kondukas al nekonateco. La nokto estas malvarma. La vento vipas kruele. La fratulinoj certe falas sur la neĝa vojo, se la vojo tie tute ekzistis. Eble ili sukcesas per manpremo subteni kaj kuraĝigi unu la alian: „Eltenu, fratino. Vi ne solas, ni estas kune. Jesuo ne forlasis nin. La bono venkos. Ni ne kulpas pri io ajn. Ni havas trankvilan konscion. Ĉi tio estas nia Kalvario".

Estas pli facile Sinjoro, kiam la homo ne solas. Kie kunestas du aŭ tri en Via nomo tie ankaŭ Vi estas kun ili. Ankaŭ dum la malfacilaj situacioj, kiam ni gloras Vin malgraŭ sufero. Kiam ni helpas unu al la alia ekstari kaj daŭrigi post la falo. Tiam Via graco kaj la bono de la proksimuloj estu nia subteno.

*Ŝi la Filon krucumitan*
*vidis morte sollasitan*
*ĝis de la spirit' eliĝ'.*



## *Dekdua Stacio: Jesuo mortas sur la kruco*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Aŭdeblas krioj kaj vekkrioj de la fratulinoj: „Jesuo, savu nin! Jesuo, Maria, Jozefo!" Rompitaj, korpe detruitaj, sed per nerompebla fido. Ili scias kiun ili fidas kaj ĉe kiu troviĝas ilia espero. La morto-ombro kliniĝas super ilin dum oni donas la lastajn batojn al ili. La momento de la morto estas la momento de la fina venko de la bono super la malbono. La fratulinoj venkis, kvankam ilia venko, samkiel tiu de Jesuo, restas kaŝita antaŭ la okuloj de iliaj ekzekutistoj. Sed Dio diris: „Vi bona kaj fidela servisto; vi estis fidela ĉe malgrandaj aferoj, mi levos vin super multajn. Aliĝu al la ĝojo de via Sinjoro" (Mat 25,21).

Sinjoro, per Via morto kaj resurekto Vi donacis la sencon al la morto kaj vi igis ĝin la pordo de la Ĉielo. Neniu homa obskuro obskuras por Vi. Per via kruco naskiĝis savo por ĉiuj kiuj mortas malhumiligitaj de la maljusto. Kaj ankaŭ por tiuj kiuj agas maljuste. Savanto de la malfortaj kaj de la senpovaj, per la forto de via resurekto en ĉiu homo finplenumu la agon de savo.

*Min allasu kunsuferi,*
*al la Fil' sur kruc' adheri*
*ĝis la lasta vivmoment'.*

## *Dekunua Stacio: Jesuo estas krucumata*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

Kriego kaj tumulto, vortoj neĉastaj kaj kruelaj, kaj tiuj kiuj ilin eldiras ĉiam pli proksimas. Tremas la piedoj de la fratulinoj, la manoj malfortiĝis, ilin plenigas timo. Kiel ili kontraŭstaru la minacon kontraŭ ilia digno al la Dio votita virgeco? Kion fari? Ne ekzistas alia eliro, krom fari tion kion sola eblis. Tra la malfermita fenestro fuĝi el ilia kaptilo, eĉ je la prezo de propra vivo. „Patro, estu tiel. Akceptu niajn animojn!“ „Fratulinoj, sekvu min“, ekkriis fratulino Jula. Kaj ili faris la decidan salton de la kredo.

Sinjoro, donu al ni la same fortan fidon kian havis la fratulinoj martirinoj, por ke ankaŭ ni dum senesperaj situacioj, kiam oni nin krucumas, ni trovu en Vi eliron kaj savon. Donu ke ni kredu al Vi, tiel kiel Vi kredis la Patron kaj per tia kredo ni venku la mondon.

*Ho komplezu al mi doni*
*kun la Fil', punita pro mi,*
*partoprenon je l' dolor'.*



## *Oka Stacio: Jesuo konsolas la jerusalemajn virinojn*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La posedanto de iu gastejo forpelis ilin, ĉar por tiaj gastoj kiaj estas la monaĥinoj, ne ekzisas loko por ili.
Ili gvidis ilin al alia domo. Al la familio kun malgrandaj infanoj kiuj scivole observas la fratulinojn. La fratulinoj havas nenion per kio ili povus al la gastigantoj danki por la pajla kuŝejo kiun ili donis. Ili povas redoni nur per dankvorto, rideto kaj preĝo.

Benu, Sinjoro, la homan kompaton kaj la kapablon rekoni kaj mildigi la suferon de la aliaj homoj. Ni ofte pensas ke ni ne povas multon fari, pro tio ni faras nenion. Helpu nin ke ni ne timu fari ĉion kion ni povas, ĉion eĉ se tio estas malmulta kaj nekonsiderinda. Helpu al ni akcepti la propran malriĉecon kaj riĉe dividi kun la aliaj la donacojn kiujn vi donis al ni.

*Ho Patrino, Font' de l'amo,*
*trafu min per dolorflamo,*
*ligu min kun via ĝem'.*

### *Naŭa Stacio: Jesuo falas la trian fojon sub la krucon*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La plej maljuna el ili, fratulino Berchmana ne povas daŭrigi. Oni decidis apartigi ŝin. Ŝi restas en la loko kie ili troviĝas, kaj la fratulinoj foriras. Elekto ne ekzistas. La fratulino Berchmana restas sola. Ankaŭ devigo povas esti beno, se oni ĝin bonvole akceptas, kun fido al Dio.

Kiam ni eksentas ke oni ne plu povas daŭrigi, ke la malfortoj kaj kadukiĝoj de korpo, animo kaj spirito disigas nin de la vivkutimoj kaj ke ni restas solaj en nia senpovo, tiam Vi, Sinjoro, etendu al ni vian manon kaj refortigu nin per Spirito vivodona. Ne permesu ke ni ekpensu ke ankaŭ Vi forlasis nin. Faru ke ankaŭ en la plej granda obskuro de la animo kaj forlasinteco ni ne perdu vivan fidon al Vi.

*Ardu fajre mia koro*
*pro la am' al Krist-Sinjoro*
*ke mi plaĉu al Li mem.*



### *Deka Stacio: Jesuo estas senvestigata*

*Ni adoras Vin, Kristo, kaj laŭdas Vin.*
*Vi savis la mondon per Va kruco.*

La vojo ilin kondukas pli foren, ĝis la kazerno en Goraĵde. La fratulinoj certe ekĝojis sciante ke ili atingis la celon de la kvartaga vojaĝo. Probable ili povos iomete ripozi kaj varmiĝi, kaj ekde morgaŭ helpi al la vunditoj. En ili aperis espero ke ilia krucvojo finiĝis. Sed baldaŭ ĉio dronos en akvon. La sola kaj fina espero al ili restos la Sinjoro.

Sinjoro, ne permesu al ni havi falsajn esperojn, nek persisti pri la mensogoj de la vivo. Precipe gardu nin de tio, ke ni kredu al la malplenaj promesoj kaj kaŝitaj trompoj de la malbono. Faru, ke ni sciu rekoni la bonon kiu de vi venas kaj kiu nin al vi kondukas, disde la falsa kaj momenta havaĵo kiu nin postlasas nudigitaj kaj ruinigitaj.

*Sankt-Patrin', kun premekscito*
*vundojn de la Krucumito*
*fiksu nun en mia kor'.*